

Kelkaj informoj pri la brazilaj indianoj (1)

En pluraj lingvoj la nomo de Hindio (Barato) komenciĝas per “I”: “India” (angle), “Inde” (france), “Indien” (germane), “India” (hispane) ktp.

Kiam Kristoforo Kolumbo, kiu estis serĉanta okcidentan marvojon al Hindio, alvenis al Ameriko, oni pensis, ke li jam estis atinginta Azion, pli ekzakte Hindion. Pro tio kelkaj amerikaj insuloj estis nomitaj en la angla “West Indies” (“Okcidentaj Hindioj”), kaj la indiĝenoj estis nomitaj “Indians” (Indianoj). Ĉar la angla vorto por “hindo” ankaŭ estas “Indians”, oni poste nomis la indiĝenojn de Nordameriko “Red Indians” (Ruĝaj Indianoj) kaj hodiaŭ “Amerindians” (Amerikaj Indianoj) aŭ “Native – aŭ Indigenous – Americans” (Denaskaj – aŭ Indiĝenaj – Amerikanoj).

En la germana la vorto por “hindo” estas “Indier”, kaj por “indiano” ĝi estas “Indianer”.

Se en plejmultaj lingvoj (ekzemple ankaŭ en la greka kaj latina) la nomo de “Hindio” komenciĝas per “I”, kial ĝi komenciĝas per “H” en Esperanto?

En mia artikolo de la 23-a de aprilo de 2019 mi klarigis, ke: a) verŝajne Zamenhof volis eviti konfuzon kun la substantivo “indo”; b) en la persa la nomo de Hindio estis “Hindustan”, kaj tiu vorto estis uzata kelkfoje ankaŭ en aliaj lingvoj, kio igis Zamenhof-on enmeti la komencan “h-on”.

Bone, post tiuj klarigoj pri la vortoj “Hindio/hindo” kaj “indiano” mi fakte parolos pri la brazilaj indianoj. Pri ili ekzistas artikolo en la E-Vikipedio, el kiu mi ĉerpis kelkajn gravajn informojn. (Ili estas skribitaj kursive.)

Evidente mi scias, ke la vikipediaj informoj ne ĉiam estas ĝustaj, sed tio okazas ankaŭ kun presitaj enciklopedioj kaj libroj. Krome ekzistas ofte diversaj teorioj.

Laŭ la plej kutima teorio la origino de la indiĝenaj popoloj de Brazilo – same kiel tiu de ĉiuj indiĝenaj popoloj de Ameriko – troviĝas en Azio. Dum la lasta glaciepoko antaŭ proksimume 30.000 ĝis 40.000 jaroj homoj migris trans la Beringa Markolo al norda Ameriko kaj koloniis iom post iom la reston de la du-kontinento. [Ili alvenis al Brazilo antaŭ proksimume 10.000 jaroj.]

Ŝtonpentraĵoj kaj postrestaĵoj de loĝlokoj malkovritaj antaŭ nelonge tamen refutas tiun ĉi teorion kaj [oni] supozas [nun], ke la indiĝena priloĝado de Brazilo estas retrodatigebla ĝis antaŭ 50.000 jaroj. Arkeologiaj trovaĵoj en [la ŝtato] Piaŭio estas 60.000 jarojn aĝaj. [Vidu mian artikolon de la 15-a de novembro de 2016, titulitan “Kiam la homo alvenis al Ameriko?”]

La plej radikala okazintaĵo en la historio de la brazilaj popoloj estas la alveno de eŭropanoj [en 1492] kaj la postsekva koloniigo de Ameriko. Tiutempe ekzistis taksokalkule 1.000 popoloj, kiuj konsistis el entute kvin milionoj da homoj. Nun ekzistas ankoraŭ nur 350.000 indiĝenuloj kunloĝantaj en proksimume 215 popoloj.

La unuaj kontaktoj inter eŭropanoj kaj [brazilaj] indiĝenoj en la unuaj jaroj de la 16-a jarcento pasis relative pacaj, ĉar ilin regis la scivolemo pri la fremda [kulturo] kaj la interŝanĝo de varoj tipaj por la lando. Intimaj rilatoj (plejparte sen oficiala geedzeco) inter portugaloj kaj indiĝenoj [...] ne estis malkutimaj, kaj tiel jam frue komenciĝis en la historio “kunfandiĝo” de etnoj kaj kulturoj.

Venontan semajnon mi daŭrigos ĉi tiun artikolon.

